## *Ŝanĝu la kapojn!*

Trovu por ĉiu vorto novan kapliteron, por ke ekestu novaj sens-plenaj vortoj. La novaj literoj formiĝos al Zamenhofa proverbo.


Por faciligi la solvon mi metis inter du vortoj distancon per strio.
tasko atendi lorno avo - rolo strio modo - ino lobo sorto lano ardo - plekti mano sorto emo polvo - adzo volo ero lupo - mento aro - seĝo - koro ambro lito odoro lado abstini

⌘

*Solvo de la septembra numero*

| | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 8 | 5 | 1 | 3 | 9 | 6 | 4 | 7 | 2 |
| 6 | 7 | 4 | 8 | 5 | 2 | 3 | 1 | 9 |
| 9 | 3 | 2 | 1 | 7 | 4 | 6 | 5 | 8 |
| 5 | 8 | 3 | 4 | 6 | 7 | 2 | 9 | 1 |
| 7 | 2 | 6 | 5 | 1 | 9 | 8 | 3 | 4 |
| 1 | 4 | 9 | 2 | 8 | 3 | 5 | 6 | 7 |
| 2 | 6 | 8 | 7 | 3 | 1 | 9 | 4 | 5 |
| 3 | 1 | 5 | 9 | 4 | 8 | 7 | 2 | 6 |
| 4 | 9 | 7 | 6 | 2 | 5 | 1 | 8 | 3 |

Kontaktu nin! Gun.Eb@t-online.de +49 3831 490003



# Stralsundaj frekvencoj

**Per Esperanto por popolkompreniĝo**

E

jaro 2007 novembro

Junaĝe ja estis mi
gaja pro l’ maten’,
ploris je vesper’;
nun mi pliaĝas,
dubante vidas
komencon, sed
sankta, serena
estas la fino.

laŭ Friedrich Hölderlin

Aŭtuno estas tempo de medito kaj filosofado. La poemo de Hölderlin certe donas instigon por pripensado kaj eble diskutado. Aranĝu tion dum viaj E-renkontiĝoj! Sur la sekvaj pagoj mi hodiaŭ elektis poemon de Günther Peek. Ĝi volas semi optimismon por nia movado kaj en smpla formo provas instigas nin por pluagado.

# Kompreniĝo

Sin kelka homo kontentigas,
ĉar ege vojaĝad' klerigas.
Por havi per kontaktoj ĝojojn,
li sen turistoj serĉas vojojn.
Kaj ĉar li jam la lingvon konas
nun oni Grandbrituj' proponas.

Allogas nun la varmaj zonoj,
jen, kie floras la citronoj.
Sed la orel' nun aŭdas ion;
hispane do li taksas tion.
Latinan lerni li komencis,
sed tio certe ne parencis.

Li antaŭkredas facilecon;
itala havas muzikecon.
Ni kompreniĝos do per kantoj
en lando de l' muzikamantoj.
Ridinda estas la ekzerco ;
fariĝas diskutad' nur ŝerco.

Popollernejo jen ofertas,
por ke li ne enuon spertas,
ke Esperanton lernu li.
Li faras ĝin kun emoci'.
Kaj baldaŭ sekvas adaptado,
leteroj kiel klerigado.

Kaj la vojaĝojn li komplete
do planas delegitorete.
Kaj pro kontakto per persono
fariĝas ĉio laŭ bezono.
Ĉar do la lingvo nin kunligas,
al amikeco ĝi instigas.

Sed kion li de hejme scias,
ĉi tie vere ja nenias
Malbona estas komprenado
kaj ne funkcias babilado.
Veter' kaj manĝo ne altiras;
pro tio li al sudo iras.

Jen en Francujo kun elano
li provas nun per buŝ' kaj mano
la diskutadon kun la homoj.
Fiaskas jam prononc' de l' nomoj.
Direktas sin pro malkuraĝo
al Italuj' nun la vojaĝo.

Ferioj foras kaj la mono,
kaj regas tamen la malbono.

Nun jam li trovas en kunvenoj
amikojn fremdajn sen problemoj.
Jes, tion vere lin nun ŝatas,
kaj gaje fine li konstatas,
ke ĉiujn bone li komprenas,
de kie ili ankaŭ venas.

Komprenon serĉas vi ne vane,
se trovos vi samideane
la aliulojn, kiuj emas,
ke ĉiuj homoj sin komprenas!

laŭ Günther Peek el la germana de Gunter Ebert

# Venu al Stralsund!

Nia landa asocio Meklenburgio-Antaŭpomerio (LAMA) devas elekti novan estraron. Sekve ĉijare okazos la baloto je la 8a de decembro en Stralsund. Nia urbo jam ĉiam estis alloga por turistoj kaj ankaŭ niaj E-aranĝoj ĉiam estis laŭdataj. Ĉefe ili okazis en somero aŭ frua autuno, sed la jara ĉefkunveno de nia asocio dum la lastaj jaroj ĉiam estis aranĝita samtempe kun la Zamenhof-festo en decembro. Tiel ankaŭ la ĉijara estis planita.

La *Intercity*-hotelo troviĝas senpere ĉe nia ĉefstacidomo. La enirpordo troviĝas ĉe la bushaltejo. Kiu venas per trajno, do nur devas iri kelkajn paŝojn direkte al la urbocentro kaj ne transiri la straton. Ankaŭ por aŭtomobilistoj la afero estas komforta. Venante el la direkto de Rostock oni enveturu la straton dekstre malantaŭ la hotelo (Bahnhofstraße). Tie troviĝas la eniro de la parkdomo de la hotelo. Sed, se vi daŭrigos la vojon ĉ. 100m, vi ankaŭ trovos senkostajn parklokojn.

Se vi venos de la alia flano, do de la urbocentro, vi kompreneble devas veturi maldekstren antaŭ la hotelo.

Uzante la aŭtovojon A20 de okcidento veturu ĝis la elveturejo *Tribsees* kaj sekvu la straton ĝis Stralsund. Vi alvenos je stacidomo. De la orienta flanko (Neubrandenburganoj) veturu ĝis la elveturejo *Stralsund* kaj sekvu la B 96n ĝis la elveturejo Tribseer. De tie vi uzu la stratojn “Karl-Heydemann-Ring” kaj “Tribseer Damm” al la stacidomo. Destre malantaŭ la stacio troviĝas la hotelo.

La programo dependos de la daŭro de la baloto kaj de la vetero. Kompreneble ni povus veturi per niaj aŭtomobiloj sur la novan *Rügen*-ponton aŭ laŭ deziro fari mallongan promenon sur nia kristnaska foiro. Preparata estas ankaŭ bildrakonto pri la UK en Jokohamo kaj Tokio.

Kaj nun mia lasta peto. Informu min nepre, ĉu vi partoprenos aŭ ne! Mi devas anonci ĝis la 28.11. en la hotelo la precizan nombron de la gastoj. Laŭ tio ni poste ankaŭ ricevos la fakturon. La paŭŝalan monon de 14€ po persono pagos la asocioj (GEA kaj LAMA).
Do mi diras: “Bonvenon!”

Gunter